# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo julio/aŭgusto 2020**

## LA ESPERANTISTA AGADO PLU FLORAS EN LA RETO

Plu restas provizore ĉesigitaj la ĉeestaj esperantistaj eventoj en la tuta mondo, pro la malcertecoj pri la sanitaraj kondiĉoj. En Madrido estas jam malfermita la sidejo de HEF, sed tamen bv. informi antaŭ ol alveni se vi planas ĉeesti.

Ankaŭ la Hispana Kongreso de Esperanto, kiu, kiel oni scias, estis okazonta en la urbo Comillas (Kantabrio), kaj kiu jam estis prokrastita al la monato oktobro, estis denove prokrastita ĝis la venonta jaro. Ĝi okazos denove en la pontofesto de majo, sed de 2021.

Bonŝance, tamen, kreskas la iniciatoj por virtualaj esperantistaj renkontiĝoj en la tuta terglobo. En junio estis inaŭgurita en la reto la Monda Festivalo de Esperanto, MondaFest' 2020, kiu daŭros ĝis la 20a de septembro. MondaFest estos originala evento, kiu enhavos multnombrajn internaciajn esperantistajn renkontiĝojn, kiuj kutime okazas ĉiujare en somero, kaj ebligos virtualan kontakton de la parolantoj de la internacia lingvo en ĉiuj mondopartoj. MondaFest'2020 estos speciala elmontro de la kultura riĉeco de Esperanto kaj de la vivanteco de ĝia parolkomunumo. Ĝi inkludos la Virtualan Kongreson de Esperanto, kiu en la unua semajno de aŭgusto anstataŭos la Universalan Kongreson, kiu devis esti prokrastita pro la kronvirusa pandemio.

Oni povas sekvi la programon en la retejo http://mondafest.net aŭ en http://EventaServo.org, kie kolektiĝas multnombraj esperantistaj eventoj organizitaj en la tuta mondo, ĉeeste aŭ virtuale. La inaŭguro kaj aliaj pecoj estas spekteblaj en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/user/UEAviva.

## RENKONTIĜOJ EN FUENLABRADO

Jam pretas la nova sidejo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo. Ĝi situas en la Centro de Edukado por Plenkreskuloj, en strato Creta n-ro 2. Ĝi ricevis tablojn kaj seĝojn, grandan skribtabulon kaj ekranon por projekciado, eĉ bretaron. Por plenigi ĝin oni akceptas libro-donacojn.

Okazis inaŭgura festeto la 24an de junio. La grupo jam planas novan kurson por oktobro. Kontaktu ĝin per http://www.esperanto.es/fel/.



## POR PLIAJ INFORMOJ

Por informiĝi pri daŭraj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com